

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 15.5.2013*

## **Petro Ginz**

*Vlastimil Novobilský kaj Věra Novobilská*

En la jaroj 1953-1958 mi studis matematikan-fizikan fakultaton de la Karlo-Universitato en Prago kaj dum tiu ĉi tempo mi (preskaŭ) regule vizitadis la pragan esperantistan klubon. Tie mi konatiĝis kun eminentaj ĉefaj esperantistoj, ekz. kun Rudolf Hromada, Jaroslav Mařík, JUDr. Tomáš Pumpr k.a. Inter ili estis ankaŭ fervora esperantisto Ota Ginz, laŭdevene judo, kiu nur hazarde transvivis la tempon de la faŝisma teroro dum la dua mondmilito.

Post la milito, en la jaro 1956 li kaj lia edzino Marie Dolanská-Ginzová transloĝiĝis al Israelo. Dum lia vivo en Israelo ni interŝanĝis leterojn kaj kiam li vizitis Ĉeĥoslovakion por kuraci sin en banloko Jáchymov mi surbendigis lian rakonton pri sia vivo kaj Esperantista aktiveco. La sonbenda intervjuo troviĝas nun en la muzeo en Vieno.

En niaj buŝaj aŭ perleteraj kontaktoj, eĉ ne en la sonbenda intervjuo, O. Ginz tuŝis nomon de sia filo Petro (ĉeĥe: Petr) kaj ties teruran sorton. Mi estas preskaŭ certa, ke ankaŭ aliaj membroj de la klubo en Prago ne sciis ion pri tio. Nur malfeliĉa okazintaĵo kaŭzis, ke mi konatiĝis kun la drasta sorto de lia familio dum la dua mondmilito.

Pri tio kaj speciale pri la sorto de Petro mi kaj Věra volas nun rakonti al vi.

Ni decidis paroli hodiaŭ pri ĉi tiu temo ankaŭ pro tio, ke ĉi jare oni rememoras la 10-an datrevenon de la tragika averio de la usona kosmoŝipo Columbia, kiu ankaŭ rilatas al Petro Ginz.

Krome: nia esperantlingva traduko de „Deník mého bratra - Taglibro de mia frato“ de Chava Pressburger, fratino de Petro, estis finita en majo 2005. En simbola monato, en kiu ni rememoris la 60-an datrevenon de la fino de la plej terura milito en la homarhistorio, kies juna viktimo Petro Ginz fariĝis. Kaj ĝuste la aŭtentan ateston pri ĝi prezentas la publikaĵo „Taglibro de mia frato“.

Permesu, ke ni antaŭ la plua rakontado diru kelkajn vortojn pri la Esperanta medio de familio Ginz.

Petro Ginz (1928-1944) kaj lia fratino Eva Ginzová (1930-) naskiĝis al esperantistaj gepatroj. La patro Ota Ginz, judo, estis estro de eksporta sekcio de teksaĵentrepreno en Prago. La gepatroj estis progresemaĵoj, zorgis pri klerigo kaj sana vivmaniero de siaj infanoj.

Ilia patrino, Marie Dolanská-Ginzová, estis ĉeĥino, kiu post la transloĝiĝo al Israelo akceptis nomon Mirjam.

Ŝi, en letero sendita al mi, rememoras: „Mi kun mia edzo parolis tre ofte en Esperanto. Ĝin ni tamen ne uzis en rilato al niaj infanoj, kies E-instruon ni planis por ilia pli posta aĝo. Tamen subite ni rimarkis, ke ambaŭ infanoj sen iu ajn helpo de nia flanko, en tre frua aĝo, ekkomprenis Esperanton, eĉ kun multaj komplikitaj formoj. Same subite, surprizinte nin, ili mem ekparolis en bona Esperanto“.

Sian taglibron Petro komencis skribi en sia dektria jaro (1941), la skribadon li finis mallonge antaŭ ol li, kiel dekkvarjara (1942), estis deportita al la Terezín getto en norda Bohemio. (Kiel unua ricevis ordonon por transporto al Terezín la patro Ota Ginz. Tiam li estis malsana pro akuta pulm-inflamo kaj pro tio lia forveturigo estis forŝovita.)

Laŭ la germanaj rasismaj leĝoj infanoj el miksitaj familioj povis resti ĉe la gepatroj ĝis la aĝo de 14 jaroj. Atinginte tiun ĉi aĝon venis al Terezín unue Petro kaj post du jaroj ankaŭ Eva kaj la patro.)

La Taglibron de Petro reprezentas nur du etaj kajeretoj el malnova papero propramane binditaj. En tiu militempo ne estis facile ion prizorgi kaj bela nova kajero el papervendejo estis por la judaj infanoj tute neatingebla.

Ĉi tiuj du taglibretoj de Petro denove aperis nur post sesdek jaroj, en la jaro 2003, nome dum tre strangaj cirkonstancoj.

Kiam en la jaro 2003 estis preparata la starto de la usona raketoplano Columbia, estis membro de la stabo ankaŭ Ilan Ramon el Israelo, kies patrino travivis teruraĵojn de la eksterma koncentrejo Aŭŝvico (germane: Auschwitz, ĉeĥe: Osvětim). Eble eĉ pro tio Ilan volis kunpreni en la kosmon ion kiel memoraĵon, simbolon de la Holokaŭst-tragedio. Li turnis sin al la Holokaŭst-muzeo Jad Vašem en Jerusalemo, kie estas krom multaj aliaj dokumentoj prizorgata ankaŭ plejparto de la konservitaj desegnaĵoj de Petr.

Petro estis nome tre talenta, kreiva, diligenta kaj sciavida knabo kun diversspecaj intereso. Li skribis artikolojn kaj rakontojn, li estis aŭtoro de kelkaj nelongaj romanoj, li ŝatis ankaŭ desegni kaj pentri. Atesto pri la nekutima fantazio de Petro estas lia bildeto „Luna pejzaĝo“ – kaj ĝuste ĉi tiun desegnaĵon elektis dungitoj de la Art-Muzeo Jad Vašem, komune kun Ilan Ramon, por lia intenco kunpreni ĝin en la kosmon. Sur la bildo oni vidas tri akrajn montpintojn de la Luna pejzaĝo, kvazaŭ tri fingrojn celantaj en la kosmon. Sur la fono brilas la Terglobo.

Tiu ĉi bildeto “Luna pejzaĝo” kune kun la eta portreto de la ridetanta knabo Petro, estis emisiita fare de Ĉeĥa poŝto okaze de la jam menciita averio de la usona kosmoŝipo Columbia STS 107.

La tragika sorto de la kosmoŝipo Columbia skuis la tutan mondon. Astronaŭto Ilan Ramon, same kiel la ceteraj membroj de la stabo, la esplorflugon de la kosmoŝipo ne postvivis. En unusola momento la 1-an de februaro 2003 finiĝis ilia vivo.

Ĝuste la desegnaĵo de Petro, kiun Ilan Ramon kunprenis en la kosmon, estis tio, kio elportis el tenebro al la lumo de la mondo paĝojn de la taglibro de Petro, kiun li skribis en periodo de la 24-a de februaro 1941 ĝis aŭgusto 1942.

Kelkajn semajnojn post la tragika fino de la kosmoŝipo, sinjoro Jiří Růžička el Říčany kontaktis la Art-muzeon Jad Vašem kaj ofertis al ĝi por aĉeto sume ses kajerojn skribitajn far

Petro kaj krom tio liajn desegnaĵojn. Tiun ĉi postlasaĵon li trovis en malnova domo en Prago-Modřany, kiun li antaŭ kelkaj jaroj aĉetis. Dume li plejparton da fattraso, per kiu estis tiu malnova domo plenŝtopita, elĵetis, ĉi tiujn kajerojn kaj desegnaĵojn li, pro iaj neklarigeblaj motivoj, konservis. Pri sia „trovaĵo“ li ekmemoris, kiam oni en la ĉeĥa televido priskribis konekse kun la tragedio de Columbia ankaŭ la sorton de la praga knabo Petro Ginz, kaj li sendis per interreta poŝto al Israelo specimenojn de la trovitaj tekstoj kaj desegnaĵoj.

Kiam ĉi specimenojn ekvidis fratino de Petro, Chava Pressburger (origine Eva Ginzová), vivanta tiam en Israelo, ŝi estis tre ekscitita. Laŭ ŝiaj vortoj ŝi havis impreson, kvazaŭ Petro eble eĉ ne estus mortinta, ŝi sentis ke li vivas en eterneco kaj tiamaniere li sendas sciigon pri si kaj certan mesaĝon.

La nove trovita postlasaĵo enhavis du taglibretojn, en kiujn Petro notis okazintaĵojn de la jaroj 1941-1942, el la tempo antaŭ sia deporto al Terezín, kiam ilia tuta familio ankoraŭ vivis kune hejme en Prago. Kiam ŝi ekvidis paĝojn de la taglibro kaj desegnaĵojn de Petro, ŝi tuj estis certa pri ilia aŭtentikeco. Ŝi tuj rekonis la manskribon de la frato kaj rememoris la okazintaĵojn, kiuj estis ĉi tie priskribitaj. La skribmaniero de Petro iom post iom sur la paĝoj de la taglibro ŝanĝiĝis, fariĝis nerva kaj malpli legebla konekse kun tio, kiel proksimiĝis la dato de lia envicigo al Terezín-transporto. Petro ne skribis eksplicite pri sia timo antaŭ la estonteco, tamen en liaj notoj respeguliĝas nigraj nuboj, kiuj koncentriĝis super li, por ke ili fine lin englutu.

Krom la taglibroj estis trovitaj ankaŭ linogravuraĵoj de Petr, plejparte ilustraĵoj por romanoj de Jules Verne, tiutempe la plej ŝatata verkisto de Petro. Estis ĉi tie ankaŭ la unua parto de unu el la romanoj de Petro, du aliaj kajeroj de liaj artikoloj kaj fine indeksoj de la literaturaj verkoj, kiujn Petro verkis.

Post komencaj komplikaĵoj rilate la pretendon al la heredaĵo de la postlasaĵo de Petro, sinjorino Chava fine sukcese akiris du taglibretojn kaj kelkajn linogravuraĵojn. Ĉio cetera apartenas nun al la Art-Muzeo Jad Vašem en Jerusalemo.

Petro interesiĝis eble pri ĉio. Hodiaŭ ni povas nur supozi, kien direktiĝus la vivovojo de Petro kaj kiu el lia larĝa interesspekto fariĝus la dominanta.

Petro estis ĉiam tre agema, eĉ en Terezin getto. Laŭ liaj koncizaj notoj oni povas ekscii, ke li ĝis sia transporto la 28-an de septembro 1944 al Aŭŝvico multe legis (ekz. librojn de London, Arbes, Wells, Descartes, Balzac, Gorkij, Dickens, Schweitzer, Wilde, May, Thomas Mann k.a.).

Krome ni ekscias, ke li estis okupita en linografio, pretiĝis fizikan mapon de Azio kaj komencis krei mondan mapon laŭ Mercator-projekcio.

Kun granda intereso li studis antikvan epokon, li dediĉis atenton al la vivmaniero kaj kulturo de egiptoj, asiroj, babilonanoj, hindoj, fenikoj, israelanoj, grekoj, persoj ktp.). Li studis geografion de diversaj landoj, eĉ de la Luno.

Li ankaŭ lerte desegnis. Krom multaj atentindaj bildoj ni jam menciis tiun, kies kopio flugis en la kosmon.

Petro faris parte enkaŭ kaj parte surpapere supervidon pri zoologio. Li ankaŭ vizitadis vesperajn prelegojn (ekz. pri Rembrandt kaj aliaj personecoj).

Li perfektigis nivelon de sia kono de la angla lingvo.

Inter la fragmentoj savitaj el Terezín getto ekzistas ankaŭ 2 paĝoj de Esperanta-ĉeĥa vortaro, kiun li plej verŝajne kompilis laŭ sia memoro. Kia estis origina amplekso de la vortaro kaj ĝia vera celo ne estas konate.

Tion, ke Petro estis knabo kun riĉa fantazio, dokumentas interalie ankaŭ liaj literaturaj laboraĵoj kaj provoj. En la aĝo inter ok kaj dek kvar jaroj li skribis sume kvin romanojn: „El Prago al Ĉinio“, „Saĝulo el Altaj“, „Vojo al la centro de la Tero“, „Dum unu sekundo ĉirkaŭ la mondo“ kaj „Vizito el la pratempo“. Kiel evidentiĝas jam el la cititaj titoloj, Petro tre admiris la francan verkiston Jules Verne. Li dediĉis sin al legado de liaj libroj tiugrade, ke li eĉ unu libron skribis kvazaŭ lianome: temas pri la romano „Vizito el la pratempo“, kiu kiel la sola el la kvin menciitaj titoloj saviĝis kompleta kaj aperis jam libroforme. Atentindaj estas tiuj partoj de la romano, kiuj tuŝas problemojn inter la homaj rasoj, endanĝerigojn de la homaro fare de senskrupulaj milituloj k.a.

Eble ekestas demando, kiel estas eble, ke Petro en Terezín getto povis realigi tiom multajn aktivecojn. Oni povas verŝajne ekspliki tiun ĉi enigmon per tio, ke la atmosfero en Terezín estis pli milda ol en aliaj ekstermaj koncentrejoj. Pli milda pro tio, ke Terezín getton vizitis reprezentantoj de internaciaj institucioj por surloke supervidi la situacion tie regantan. Gestapanoj zorgis pri tio, ke iliaj krimoj estu kaŝitaj kaj pro tio ili aranĝis la vivon en la getto tiamaniere, por ke ĝi sukcesu trompi la vizitintojn.

Tamen ĉiuj menciitaj aktivecoj devis esti farataj sekrete. Oni devas konstati, ke Terezín estis nur antaŭŝtupo por amasekstermaj koncentrejoj.

Nun ni volas mencii alian agadon de Petro en Terezín: unu el la fruktoj de la nekutima energio de Petro estis la semajngazeto „Vedem“, semajngazeto skribita far grupo de junuloj vivantaj komune kun Petro en la getto. Mirinde, ke la gazeto ĝisvivis finon de la milito kaj nun povas liveri ateston pri tiamaj tempo kaj vivo.

Petro ĉi tiun gazeton fondis, redaktis, prizorgadis por ĝi artikolojn, kaj se da ili ne estis sufiĉe, li skribis ilin sub diversaj pseŭdonimoj mem. La gazeto „Vedem“ publikigis felietonojn, poemojn, meditojn pri pasinteco kaj futuro, pripensojn, kiuj esprimis ne nur senpovecon koncerne la tiutempan situacion, sed ankaŭ kredon kaj esperon por estonto.

Ĉi tiun gazeton „Vedem“ rememorigis antaŭ nelonge sur ondoj de la radiostacio Praha II konata ĉeĥa ĵurnalisto Stanislav Motl en intervjuo kun Jiří Kotouč, kiu redaktis tiun ĉi gazeton kiel kunlaboranto de Petro. Nur dank’ al hazardo li saviĝis kaj ĝisvivis finon de la Dua Mondmilito. Li donis al la radio-aŭskultantoj personajn rememorojn pri Petro, pri la kunlaboro kun li kaj pri la vivo en la koncencentrejo ĝenerale.

En la gazeto aperis ankaŭ, krom aliaj, poemo de Petro „Rememoro pri Prago“ poemo pri la urbo, kiun li tiom amis, sed kun kiu revidiĝo ne plu estis por li destinita.

La versojn esperantigis Miroslav Malovec.

En Terezín Petro ekkomprenis, kio minaca povas ekesti en la homa historio. Sed tio neniel ŝanĝis lian vivon kaj celadon. Pri tio plej bone atestas citaĵo el la artikolo, skribita de li en la getto:

“Oni elŝiris nin maljuste el la nutra grundo de laboro, ĝojo kaj kulturo, el kiu povus ĉerpi nia juneco. Per tio oni sekvas la ununuran celon – neniigi nin ne fizike, sed anime kaj morale. Ĉu oni sukcesos? Neniam! Estante senigitaj de la estintaj fontoj de kulturo ni kreos novajn. Disigitaj de la fontoj de la iama ĝojo, ni kreos por ni novan kaj ĝoje jubilantan vivon!”

Estas mirinde, ke tiajn vortojn kapablis eldiri tiel juna knabo. Sed Petro tiam ankoraŭ ne divenis drastan planon de “ONI”, ke “neniigon animan kaj moralan sekvos ankaŭ neniigo fizika”.

Je la fino permesu, ke ni citu el la “Taglibro de mia frato” unu alineon el niaj “Enkondukaj vortoj”:

“La tradukintoj de la origine ĉeĥlingva versio en Esperanton deziras, ke tiu ĉi libro disportu avertan mesaĝon precipe al la junaj generacioj en diversaj landoj de la mondo, kiuj ne rekte spertis la krudan bestiecon de la naziismo kaj povus facilanime opinii, ke temas pri io longe pasinta, ne plu ripetebla.”

